# Enhavo

Frontopaĝo - Quiada
- 3 - Financa raporto 2008
- 4 - Demokrata Edukado - Demokrataj lernejoj
- 9 - Demokratisma esenco de edukado de matematiko
-10 - Kio estas demokrata edukado?
-12 - Etiko aŭ relegio?
-13 - Internacia Konferenco por Demokratia Edukado
-15- Monumentoj kaj tomboj de militmortintoj
- 17 - Ratifo de la Traktato de Oslo
- 18 - Spertoj dum la milito
- 22 - Baza enspezo en la aktuala situacio de ekonomia krizo
- 25 - Leterkesto - Via opinio valoras.
- 26 - Grupo por la Liberecana Memoro en Valadolido
- 27 - La febla klasbatalanto
- 30 - Teruraj estas ne gripo, sed facile panikita socio
- 31 - etan reagon
- 32 - Mortkondamnita

## Donacoj

| | |
|---|---|
| JAX Rudolf Austrio | 3€ |
| ANONIME Francio | 125€ |
| SABATIER Tereza | 129€ |
| ANONIME Francio | 125€ |
| LANE LJ Britio | 18 £ |
| PRENT Britio | 15 £ |
| F. O'FATHAIGH Britio | 2 £ |
| MAC DOWALL Britio | 5 £ |


# Sennaciulo


OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
Plenum-Komitato de SAT :
Prezidanto : Jakvo Ŝram
Ĝenerala Sekretario : Vinko Markovo
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Guy Cavalier, Stefano Herve Gérard Lieblang, Franjo Leveque-Provost, Arturo Prent.

Redakta Komitato - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Tonyo Del Barrio, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Vito Markovo, Cindy McKee, Gary Mickle, Viola Murasaki, Cyril Orsingher, José Maria Salguero (Kani), Serge Sire, Jakvo Schram. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T..
Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.**
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 15-a de aŭgusto 2009.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimensuel. Le directeur de la Publication: Jacques Bannier; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567


*Tekston pri Baza enspezo vi trovos sur paĝo 22 ĝis 24*

# FINANCA RAPORTO 2008

La presokosto estas pli malalta pro sendo de pli dikaj gazetoj sed malpliofte. Tio ankaŭ okazigas iom malpli altan sumon de la sendokostoj (pli pezaj tamen). Ne plu estas amortizoj ĉar la materialo estas tre malnova, ni esperu ke ĝi daŭre eltenos. Parto de la valoro de vojaĝo-honorarioj estas ne elspezitaj ĉar redonitaj kiel donacojn. Honorarioj, duono de la sumo rilatas la PIV venditajn. La malkresko de la kotizoj estas pro japanaj kotizoj de 2006 alvenintaj en 2007 kaj pruntoj iĝintaj donacoj kaj pro pli altaj donacoj en 2007. La jaro 2009 estos transira jaro, en kiu ne plu estos salajroj, sed tamen ankoraŭ saldoj de la nuligita posteno. Jaro en kiu ni devos daŭrigi la novan organizon, al kiu ni jam progresis, sed ĉiu Satano devas klopodi por ke la membraro bone evoluu por alporti kotizojn, agi en sia medio kaj informi prie, verki artikolojn kaj helpi en la asocialaboro por tiel ebligi plifortigon de SAT.

### ASOCIAJ SPEZOKONTOJ POR LA JARO 2008 (en €) - PARIZO

| Kostoj | 2008 | 2007 | Rimedoj | 2008 | 2007 |
|---|---|---|---|---|---|
| Aĉeto de varo | 497 | 2935 | Vendo de varo | 10256 | 11345 |
| Variado de la stoko* | 2497 | 1979 | Kotizoj, abonoj, donacoj | 38567 | 56191 |
| Aliaj aĉetoj kaj servoj | 133 | 333 | Repreno de provizoj | 1750 | 2500 |
| Presokosto | 4596 | 7385 | Interezoj | 41 | 0 |
| Sendokostoj de la revuoj | 4943 | 5144 | **Rezultato (perdo)** | **17505** | **5431** |
| Aliaj afrankaj elspezoj | 469 | 475 | **Entute** | **68119** | **75467** |
| Sidejaj domŝarĝoj | 2056 | 2789 | | | |
| Telekomunikiloj | 437 | 1004 | | | |
| Elektro | 403 | 670 | | | |
| Vojaĝoj, honorarioj | 1775 | 1180 | | | |
| Asekuro | 281 | 336 | | | |
| Impostoj kaj taksoj | 45 | 43 | | | |
| Salajro malneta (nete 24103) | 31769 | 31664 | | | |
| Sociaj ŝarĝoj | 16073 | 16325 | | | |
| Provizoj | 1350 | 2448 | | | |
| Financaĵoj | 50 | 13 | | | |
| Diversaĵoj | 745 | 744 | | | |
| Rezultato (profito) | | | | | |
| **Entute** | **68119** | **75467** | | | |

*+(aĉetkvanto < vendokvanto); -(aĉetkvanto > vendokvanto)

RAPORTO DE LA REVIZOROJ

Pri la kontoj de la jaro 2008, ni ricevis ĉiujn petitajn dokumentojn kaj klarigojn.
Niaj detalaj esploroj ebligis al ni konstati, ke la kontoj estas en bona ordo.
la 18an de junio 2009
Guy MARTIN François DEGOUL

### BILANCO JE LA 31.12.2007 (en €) - PARIZO

| AKTIVO | 2008 | 2007 | PASIVO | 2008 | 2007 |
|---|---|---|---|---|---|
| Asocia sidejo | 8437 | 8437 | Asocia Kapitalo | 12987 | 18419 |
| Meblaro | 0 | 0 | kontojara rezulto | -17505 | -5431 |
| Garantiaĵo | 0 | 152 | | | |
| **Sume (I)** | **8437** | **8589** | **Sume (I)** | **-4518** | **12988** |
| **Sume (I)** | **11333** | **13349** | **Sume (I)** | **22896** | **26139** |
| Librostoko | 16348 | 18445 | Deponoj (fakoj, membroj,pruntoj) | 75081 | 90123 |
| Debitoraj libroservoj | 4259 | 5147 | Pagotaj fakturoj kaj asociaĵoj | 847 | 686 |
| Ricevotaj kotizoj | 10006 | 3724 | Kongresdepono | 700 | 0 |
| Ricevotaj taksoj | 754 | 189 | | | |
| Aliaj debitoroj | 0 | 0 | | | |
| Rezervo | 18527 | 18527 | | | |
| Disponebla mono | 13779 | 49176 | | | |
| **Sume (II)** | **63673** | **95208** | **Sume (II)** | **76628** | **90809** |
| **Entute (I + II)** | **72110** | **103797** | **Entute (I + II)** | **72110** | **103797** |

# Demokrata edukado – demokrataj lernejoj

***"Ni vivas en de minoritatoj gvidata totalitarisma demokratio – 'demokraturo'." "Mirige, ke infanoj lernas – malgraŭ la lernejo."***

***Tiuj eldiroj ne estas nur opinioj, sed ofte realaj spertoj. Homoj elmigras el sia hejmlando, por eviti ke iliaj infanoj suferas lernejon; ili sopiras humanecan kaj demokratan edukadon.***

***La filozofo Bertrand Stern postulas kompletan forigon de lernejoj: "La institucio lernejo mem estas la problemo, kiu eĉ per plialtigo de rimedoj ne solveblas."***

(Schluss mit Schule! – das Menschenrecht, sich frei zu bilden – For la lernejon! – la homrajto kleriĝi/edukiĝi libere, Lepsiko 2006; ISBN 978-3-981044-5-4)

Por klarigi la terminojn "demokrata edukado" kaj "demokrata lernejo" necesas baze difini tion, kio estas edukado kaj priskribi tion, kio estas lernejo kaj kiom da demokratio ni permesu.

Edukado estas helpado, intervenado aŭ direktado de „elvolviĝo de fizikaj, moralaj kaj intelektaj kapabloj", kleriĝo kaj evoluo, kelkfoje eĉ subpremo kaj regado de ideoj kaj agoj.

Lernejo estas relative nova formo de institucio.

## Historio de lernejoj

Eĉ fruaj tempoj "produktis" kleriĝon. En antikva Grekio evoluiĝis sistemo de bazaj scioj kaj sekvanta supera edukado. En romia imperio tiu sistemo estis simila: 'Liberaj' geknaboj povis viziti elementan lernejon kontraŭ pago. Tie ili lernis laŭ monotona metodo de ripetado kaj parkerado skribi, legi kaj kalkuli. La lecionoj okazis ekstere. Instruistoj gajnis malmultege, la duonon de tiama laboristo, kaj havis malaltan reputacion.

Inter la aĝo de 12 ĝis 17 knaboj kontraŭ pago povis ricevi kleradon en 'sep liberaj artoj'; tiuj estis 'trivium' (3 vojoj) kun gramatiko (inkluzive literaturon), dialektiko (kun logiko) kaj retoriko ( kun juro kaj etiko) kaj 'quadrivium' [kv~] kun aritmetiko, geometrio (inkluzive geografion), astronomio (kun astrologio) kaj muzikteorio. Tiuj instruistoj gajnis pli da mono kaj ĝuis pli altan reputacion.

Ankaŭ en sekvaj jarcentoj edukiteco estis privilegio de riĉuloj kaj potenculoj. Dum longa tempo lernejoj estis ekleziaj entreprenoj kutime en monaĥejoj. En mezepokaj urboj ekestis komunumaj lernejoj kie laikaj instruistoj per tre severaj metodoj instruis legadon, skribadon kaj aritmetikon.

Nur antaŭ nelonge lerneja edukado akiris ĝeneralan aprobon. La episkopo Johano Komenius [1595 – 1670] formulis la "revolucian" postulon, „instrui al ĉiuj ĉion profunde" (en latina: omnes omnia omnina). Li skizis kvarnivelan sistemon de lernejoj ebliganta certagradan klerigon por ĉiu en sia socia tavolo.

Sekvis lernejoj en epoko de industriigo kaj imperialismo. Ili "produktis" laboremajn kaj obeemajn laboristojn kaj bravajn soldatojn. La nuntempaj sistemoj de lernejoj ne bezonas priskribon - ĉiu leganto konas kaj spertis en propra regiono...



Maria Montessori

Sufiĉas kelkaj signalvortoj por memorigi proprajn spertojn kaj travivaĵojn: ŝtataj institutoj, instruplanoj, lecionoj, horaro, taskoj, fakoj,